R.A.D.E. INFORMILO

ROTARIA AMIKARO DE ESPERANTO

Numero 36 Novembro 2015

**Bonvenon al vi, rotarianoj, kiuj parolas Esperanton!**

# LA KONGRESA SEZONO 2015 ESTIS APARTE VIGLA EN LA MEDIO DE ROTARY KAJ ESPERANTO.

La granda jara renkontiĝo de tutmondaj rotarianoj okazis de la 2-a ĝis la 6-a de junio en la kongresa centro Murumbí en São Paŭlo, Brazilo. La Metropola kaoso de tiu urbo ne rimarkis, sed estis 15.000 la rotarianoj kiuj donis apartan brilon al tiu evento.

La kontribuo de RADE al tiu monda kongreso de ROTARY INTERNATIONAL estis nia tradicia inform-stando, ornamita per buntaj afiŝoj raportantaj la aktivecojn de Esperanto en Rotary. Kiel ĉiujare la oportuneco amike renkontiĝi kun rotarianoj, kiuj konas esperanton, estis denove garantiata.

*Rotariano el Benino parolas en Esperanto*

*Jen la 4 deĵorantoj en São Paŭlo!*

Fakte aperis en nia stando inter aliaj la **elektita guberniestro Otavio Veiga** el Poço de Caldas, rotariano **Opa el Benino** kaj brazilaj rotarianoj, kiuj konas nian lingvon. Nia grupo kunlaboris ĉe la ĝenerala stando de rotariaj amikaroj, ĉe la stando por mediprotektado, ni distribuis informilojn de nova agadgrupo por preventi la uzon de drogoj ktp.

*Guberniestro Otavio Veiga*

*Mediprotekta Amikaro*

Amase vizitis la kongreson gejunuloj el diversaj landoj, kiuj nuntempe partoprenas en Brazilo la programon de la Rotaria Fondaĵo pri junulinterŝanĝo. Kun ili konversaciis dum horoj kaj tagoj nia juna volontulo ĉe la stando, rotaraktiano Leandro Freitas el São Paŭlo. Li tiel entuziasmiĝis ke jam revas volontuli en la RADE stando venontjare dum la kongreso en Seoul. Tradicie ne mankis nia brava filozofo Ron Glossop, ĉiam preta doni sian valoran kontribuon al Esperanto kaj Rotary.

*Interŝanĝstudentoj en nia stando*

*Leandro argumentas kun junuloj*

Multaj el tiuj gejunuloj vizitis nian standon kaj estis aparte interesitaj pri Esperanto kiel solvo de la komunika problemo en la mondo. Nuntempe ja ĉiuj ili estas klopodantaj lerni la portugalan lingvon, gastigante en brazilaj familioj de rotarianoj, sed alvenante kun almenaŭ 30 diversaj naciaj patrinaj lingvoj kaj pro tio sentema al neŭtrala lingvo.

**Guberniestro Zanetti el la distrikto 2050, Italio**

Alia tre entuziasma vizito en nia stando estis la itala delegacio sub la gvido de la Guberniestro de D. 2050, Fabio Zanetti. La Rotary eklubo Esperanto ja membras en lia distrikto!

Fabio Zanetti kaj siaj 12 geamikoj italaj, sincere dirite, miris, ĉar en la stratoj de São Paŭlo preskaŭ neniu parolas la anglan lingvon, kiun ili antaŭe diigente lernis. Al li ni respondis, ke sendube li estus estinta pli bonŝanca parolante la italan, ĉar São Paulo estas konsiderata la plej granda ital-devena urbo en la mondo!

*Guberniestro Fabio Zanetti kun sia delegacio alportis la standardon D.2050*

**La 100-a Universala Kongreso en Lille (FRANCIO)** estis okazo por amika rendevuo de duono de la membroj de nia nova e-klubo, kiuj plurfoje kunsidis kaj planis novajn projektojn de kunlaboro, samtempe invitante esperantistojn konatiĝi kun nia agado en la retejo.

Dum la 15.000 rotarianoj en Sao Paŭlo klopodegis sin komprenigi per pluraj naciaj lingvoj, ofte sen rezulto, la 2.700 kongresanoj de 81 diversaj nacioj en Lille, vivis la mirindan fenomenon de plensukcesa uzado de la Internacia Lingvo Esperanto!

En Lille oni celebris la centan datrevenon de la Unua Esperanto Kongreso, kiu okazis en 1905 en la apuda urbo Boulogne-sur-mer, kiam Zamenhof, en sia parolado diris :" *Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ, inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur maro kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. Benata estu la tago kaj grandaj kaj gloraj ĝiaj sekvoj!"* Ni rajtas aserti ke lia revo pri la gloraj sekvoj realiĝis konkrete kvankam ankoraŭ ne universale.

Nia nova RADE-membro en Pollando, Malgosia Komarnicka, prezentis teatraĵon dum la UK kun granda sukceso, eĉ trifoje. Temas pri memoroj de 2 pretervivintaj infanoj dum la 2-a Mondmilito kaj alvoko al Monda Paco.

Niaj rotarianoj esperantuloj aktive kunlaboris por la sukceso de la UK – Michel Dechy respondecis pri la infankongreso, Jungkee Lee kunestris la programojn, Malgosia teatris, Davide Astori prelegis kaj pluraj aliaj.

Kaj ĝoje ni brakumis nian longjaran rotarian amikon Michael, kiu lastatempe ne povis deĵori dum la mondaj konferencoj, pro malsano. Li multe mankis al ni! Baldaŭan resaniĝon al Michael!

## NACIA KONGRESO DE LA ITALAJ ESPERANTULOJ

Alia okazo de renkontiĝo inter rotarianoj-esperantistoj estis la itala nacia kongreso en San Benedetto del Tronto en aŭgusto. La rolo de rotarianoj en la programo de la kongreso estis notinda. Du membroj de nia e-klubo estis en la organiza komitato(Nicola Minnaja kaj Davide Astori). Belega kongreso kun riĉa kulltura programo, en belega natura paradizo, altiris esperantistojn el 34 diversaj nacioj. Serio de publikaj prelegoj de nia membro Davide Astori kaj la partopreno en la arta programo de Malgosia Komarnicka, donis sendube brilon al la evento.Tie ankau okazis pluraj intervjuoj kun aktivuloj de nia movado fare de ĵurnalistino el Berlino, Germanio, preparanta longdaŭran filmon.

*David Astori prelegas*

*Filmon oni faras pri Esperanto por la festivalo en Venezia en 2017*

## RADE KAJ *ROTARY ECLUB ESPERANTO* AKTIVAS EN BRAZILO

"*akvo kaj fajro en pura savana medio fascinas junajn urbanojn*".

En Brazilo la kunlaboro de RADE kun la Distrikto 4530 rezultis en tritaga vizito en septembro de 25 gejunuloj el 15 diversaj nacioj, al la Esperantista Eduka Institucio Bona Espero en Alto Paraiso.
La tre sukcesa programo de la ROTARIA FONDAĴO por interŝanĝo de gejunuloj, kiuj pasigas tutan jaron en fremda lando loĝantaj en tri diversaj rotariaj familioj, estas inter la plej sukcesaj kaj vere servas por la interkompreno kaj la paco inter la nacioj.

**Respondeca Estraro de RADE (Rotaria Amikaro de Esperanto)**
Honora Prezidanto: Eskil Svane (Svislando). .pouzasco@gmail.com
Honora Prezidanto: Marc Levin (Francio).....marc.j.levin@orange.fr-
Prezidanto: Joseph van der Vleugel (Belgio)..joseph.vandervleugel@skynet.be
Sekretario: Giuseppe Grattapaglia (Brazilo)...bonaespero.brasil@gmail.com
Estrarano: Sherry Wells (Usono).....esperantosherry@tm.net

**Kiu el vi ankoraŭ ne renovigis la senpagan membrecon, bonvole skribi al la sekretario Giuseppe Grattapaglia por ricevi la aliĝilon!**

La Estraro de ROTARY INTERNATIONAL stimulas la rotarianojn kun komunaj interesoj pri profesiaj, humanecaj, kulturaj aŭ distraj aktivecoj starigi neformalajn grupojn por realigi la celojn de R.I.

La grupo RADE, konsistanta el rotarianoj, kiuj uzas kaj apogas la internacian lingvon Esperanto, celas realigi la idealojn de ROTARY INTERNATIONAL por Interkompreno, Amikeco kaj Paco inter la nacioj, faciligi la personajn kontaktojn inter Rotarianoj de malsama lingvo-deveno kaj disvastigi la humanecajn internaciajn servojn de R.I.